

Numero 40

FAMILIA ESPERANTO n-ro 07 (2/2002)



---

# *FAMILIA ESPERANTO*

NEREGULA CIRKULAĴO  
DE RONDO FAMILIA

---



ELDONAS: RONDO FAMILIA DE UEA

## EDITORA ANGULO

*Dum la somero mi konatiĝis kun 31-jara israela esperantisto Doron Modan. Evidentiĝis, ke li estas la redaktoro de la ĵus aperinta renovigita "Israela esperantisto", ke li estis LTK-ano dum la Tet-Aviva UK, ke li instruas Esperanton... Interesa, talenta eronso - pensis mi - indus ĝi lin prezenti en FE. Mi do malkovris al li, ke ankaŭ mi redaktas E-eldonaĵon kaj tuj petis lin fari etan sinprezenton.*

*Lia unua reago estis jesa, sed kiam li trafolumis kelkajn numerojn de la cirkulaĵo, rapide li retiriĝis. FE estas por familioj kun infanoj! Vidu: ludoj, infandesegnaĵoj, ITK, porinfana poemo... Mi ne taŭgas por ĉi-presaĵo.*

*Ne! La cirkulaĵo estas ankaŭ por esperantistoj kiel Doron, kiu nur planas fondi E-familion, ankaŭ por la geaŭoj, kies infanoj vivas jam apartan vivon, por ĉiu aĝgrupo!*

*Jes, mi konscias, ke en la fokuso estas la familioj kun infanoj, sed mi ege ŝatus, ke ĉiu generacio trovi en ĝi ion interesan.*

*Doron, enmane kun la lasta FE, sidiĝis kaj ekfoliumis en ĝi, silente cerbumante kiel solvi la kontraŭdiron de niaj opinioj. Post mallonga silentado subita ekridis: Tiu artikolo de Trevor estas bona!*

*Do, tamen estas io ankaŭ por li...*

*Rezulto: legu pri Doron sur paĝoj 6 kaj 7.*

*Amike,*

*Katarina.*



**mi, mia filo kaj la ĉi-jara**

## RENKONTIĜO DE ESPERANTISTAJ FAMILIOJ (REF)

Hieraŭ mi revenis el REF en Hungario. Mi ege ĝojas, ke mi partoprenis ĝin, ĉar la celo, ke mia filo Thomas parolu pli da Esperanto, estis sukcese atingita.

Antaŭ REF Thomas (3 jaroj kaj 2 monatoj), kiam li spontanee alparolis min, parolis preskaŭ nur nederlande. Li jam uzis Esperantajn vortojn, sed ĉefe kiam mi mem ĵus uzis ilin, kaj nur rare tutan frazon. Nur la kelkajn rakontojn, kiujn mi ĉiuvespere rakontis, li konis parkere. Kiam mi turnis paĝon en la libro, li preskaŭ ĉion povis "legi". Dume li bone komprenis Esperanton, ĉar mi alparolis lin nur Esperante.

Dum REF ĉiutage mi aŭdis lin uzi pli da Esperanto ol en la antaŭa tago. Unue li uzis pli da o-vortoj kaj i-vortoj. Poste sekvis la a-vortoj kaj e-vortoj. Samtempe li uzis ankaŭ pli da Esperantaj prepozicioj. La -as sufiĉe rapide aperis, sed por la -is kaj -os li longe uzis strangajn verbokonstruojn kun respektive nederlandaj helpverboj "hebben" (havi) kaj "gaan" (iri). Ĉe la fino venis "mi", "mia" kaj "esti". Plej laste venis la uzo de "ĉu". Plej fine li ankaŭ kelkajn fojojn Esperantiĝis nedrlandan vorton. Ekzemple, li folje diris "lustrī" (nederlande "luisteren") por esprimi "aŭskulti".

Rimarkinde estas, ke lia lingvouzo klare ŝanĝiĝis, kvankam en la komenco li apenaŭ komunikis kun la aliaj partoprenantoj. Li preskaŭ ĉiam volis esti kun mi, aŭ ludis sole. Nur ĉe la fino de REF li ŝatis ludi ankaŭ kun la aliaj infanoj.


Do, jen kion la medio povas fari! Mi tamen nepre aldonu, ke mi pli kaj pli ŝajnis ne kompreni lian nederlandlingvan paroladon. Tion mi praktikis ankaŭ dum PSI (Paske) kaj dum IF (Novjare), sed tiam mi apenaŭ havis rezulton. La problemo pri tiuj aranĝoj estas, ke oni tro multe krokodilas, dum en REF tio apenaŭ okazas.

Hodiaŭ, nur unu tagon post REF, Thomas alparolas Esperante ankaŭ nederlandparolantojn kaj ankaŭ respondas ĉefe Esperante. Mi scivolas, kiel lia lingvouzo evoluos.

Do, se vi ne sukcesas paroligi vian infanon en Esperanto, vi nun konas la solvon: **REF!** Mi esperas, ke mi ne faras tro da reklamo, ĉar se venontjare, verŝajne al Francio, venos tro da nederlandparolantoj, mi timas, ke ili tro krokodilos. Eble mi tuj atentigu, ke la organizantoj de REF ne akceptas homojn, kiuj Esperanton tie intencas lerni. Oni kontrolas ĉe konatuloj, ĉu la aliĝintoj parolas Esperanton en la familio aŭ ĉu la infanoj sufiĉe bone regas Esperanton. La celojn de REF krokodilado tute malhelpus.

Dum tri jaroj mi parolis nur Esperante al mia filo kaj li apenaŭ parolis tiun lingvon. Mi ne tre kontentis. Nun mi estas feliĉa, ja mia granda peno havas rezulton.

Gaje,  
Bart Demeyere (Belgio)



Fotis:  
Lars Sözüer



## LINGVA ANGULO

### Rompu la langon

- \* Ĉu vere viro vidis vin veni?
- \* Petro trovis nur tri ŝtrumpojn.
- \* Avara avo al bazono vane venis vendi varon.
- \* Ŝi serĉas ŝercojn saĝajn por interŝanĝoj.
- \* Tri tre tristaj turistoj trafis l' trotuaron.
- \* Lokustoj lope leviĝante loze ludas ĉi-loke.
- \* Al la apartamento parte apartenas aparta portaparato.
- \* Ne plu ploru plorulino pro propra plezuro.
- \* Ĉiuj ĉasistoj ĉiam kaj ĉie senĉese ĉasu la ĉamon.
- \* Ne tremas entrepreno pertrama tertremo.
- \* Baldaŭ ankaŭ la naŭ astronautoj aperis en aŭtoj.

### Ĉu vi scias, kio estas palindromo ?

**Ĝi estas vorto, frazo aŭ verso, kiun oni povas legi en ambaŭ direktoj:**

- \* lutro - ortul'
- \* not' - ton'
- \* ne mateno, bone tamen (PIV)
- \* Etul' finiru same ove naive, via nevo emas urini flute. (R.Schwartz).



### **DESEGNIS POR NI... Alina Brücker el Germanio**



## James Rezende Piton : **LINGVA JARFINO**

**Flavio Rebello**, aktivulo de E-familia movado en Brazilo, **organizas la unuan renkontiĝon de E-familioj LINGVA JARFINO.**

La evento havos lokon **inter la 29-a de decembro 2002 kaj la 2-a de januaro 2003 en San-Luís de Paraitingo** (Sao Luis do Paraitinga), kolonia urbeto tre bone konservita, en montaro inter la urboj Taubateo kaj Ubatubo, ŝtato São Paulo. Pliaj detaloj pri la urbo kaj regiono haveblas pere de TTT-paĝoj pri turismo.

La celo estas paroligi brazilajn denaskulojn. Tial infanoj, kiuj ne parolas Esperanton, same kiel tiaspecaj parencoj aŭ amikoj tute ne akceptiĝos! Eblas akcepti nur edz(in)ojn, fianĉ(in)ojn kaj amindumant(in)ojn de esperantistoj, kondiĉe ke estos klare al tiuj personoj, ke ilia portugallingva parolado estos ne estimata kadre de la ĝenerala celo de la evento.

La gastejo estos ekskluzive destinita al E-parolantoj, tiel ke eblos krei esperantistan etoson. Oni persvadis kelkajn restoraciojn kaj lunĉejojn de la urbo adopti menuon en Esperanto por ricevi la partoprenantojn.

Estas planataj interesaj programeroj por ĉiu aĝo:


- sporta flosado (rafting) EN ESPERANTO! (kredu ja!)
- ĉevaloj
- mini-bieneto (porinfana programero)
- promenadoj en la arbaro kaj tra la urbo EN ESPERANTO!
- vizito al la plaĝoj de Ubatubo
- nokta festo (kun nur E-muziko)
- kabaredo EN ESPERANTO!
- ĉurasko, dum la transiro de la jaro
- infana teatraĵo.

La individua prezo pokapa estos RS 120,00 (60 eŭroj por alilandanoj) por la kvartaga periodo. La sumo estas pagebla en kelkaj pecoj. Infanoj ĝis 4 jaroj ne pagos kotizon. La prezo inkluzivas la gastigadon, la E-kulturajn aranĝojn kaj la ĉuraskon. Ĉiuj aliaj aktivecoj menciitaj estas aparte pagendaj, sed estas multo vizitinda en la urbeto. Pri manĝaĵoj oni devos mem zorgi kaj poste estos interkonsento inter la aligintoj.

La familioj povos resti en privataj ĉambroj kun duŝejo/necesejo. Unuopuloj povos dividi ĉambrojn kun ĝis 3 aliaj partoprenantoj.

Pliaj informoj kaj aliĝoj:

**Flavio Rebello**  
**Lingva - Esperanto-kursoj**  
**R. 7 de Abril, 235, cj, 107**  
**San-Paŭlo, SP**  
**BR-01043-000 Brazilo**



Rete: [lingva.sp@zipmail.com.br](mailto:lingva.sp@zipmail.com.br)

Informoj troviĝas sur la hejmpaĝo: <http://www.geocities.com/lingvajarfino>

## DORON MODAN

**Doron Modan naskiĝis en 1971 en Israelo. Tie li magistriĝis pri lingvistiko kaj studis muzik-komponadon. Esperantistiĝis en 1992. Dum 1995-2002 li prezidis la Junularan Esperanto-Ligon Israelan. Dum la Tel-Aviva UK en 2000 respondecis kadre de LKK pri la informado. De 2002 estas redaktoro de la revuo *Israela Esperantisto*. Gvidas lingvo-kursojn, volontulis en la C0 de UEA, iniciatis kaj organizas la landajn E-semajnfinojn. Post dekjara laboro baldaŭ aperos lia elhebrego de poemoj de kontroversia israela poetino Jona Volah.**



Kiam mi estis petata artikoleti por Rondo Familia mi miris, ĉar mi tute ne havas infanojn. Ĉu mi entute apartenas al tiu prestiĝa rondo? Tamen, kiam mi havos infanojn, ili estos la kvara e-ista generacio en nia familio. Kiel, do?

Estante mezlerneĵano mi lernis E-on pro la plej mal-rondo-famili-eca kialo. Min pelis volego, kune kun mia bona amiko, ekposedi sekretan lingvon, konspire kontraŭ niaj gepatroj, lingvon, kiun ni miskredis, neniu sur la tero scipovas.

Tamen, dum la jaroj mi instruis E-on al mia patrino, per ŝajne la plej longa E-kurso, dum centoj da ĉiusemajnaj lecionetoj unuminutaj dum ses jaroj. Starante ekzemple en la kuirejo, mi trudis al ŝi nur unu sufikson, unu tabelvorton, aŭ unu gramatikan tempon. Ŝia eltrovemo pri memortrukoj nun helpas miajn kursanojn, kiuj amegas la metodojn de "iu esperanto-lernantino".

Mia patro estas malpli krakebla nukso, sed almenaŭ li ŝatas analizi al siaj ĝeamikoj la solan vorton al li konata: automobilejo.

Mia patrino havis jam de infaneco subkonscian ligon al Esperanto: La fama Tel-Aviva kuracisto kaj Esperantisto, D-ro Henrik Mashler, estis ankaŭ la familia kuracisto. Krome ŝi loĝis vid-al-vide al la centra polikliniko "Zamenhof". Kiam la loĝejo devis forvendiĝi, potencialaj aĉetantoj demandis al la 5-jarulino: "Kia estas la vivo ĉe Zamenhof?" -"Ho, belega", ŝi respondis, "Ĉiumatene je la 5-a la flegistinoj ekkantas tiom bele". -Loĝejoj ŝi do ne scipovis vendi, sed E-on jes! Ŝi konvinkis mian fratinton lerni la lingvon.

Unu tagon, post kiam ŝi jam scipovis paroleti E-on, mia patrino sugestis, ke mi prenu ŝian patrinon al Zamenhofa Vespero. Kiam mi telefone invitis ŝin, la avino surpriziĝis: "Mi iam lernis Esperanton, en Lublino, en 1931. Mi eĉ estis tiu kiu faris la kursfinan paroladon." Sed dum la evento ŝi flustris al mi firme kaj decideme: "Esperanto ege ŝanĝiĝis!. Mi nenion komprenas." Poste ŝi konfesis, ke "eble" ŝi forgesis la tuton.

La Esperanta "viruso" atakis ankaŭ mian 18-jaraĝan kuzon. Li aliĝis al mia kurso kun sia amikino, ekde la kvara leciono, sed tamen ili estis la plej brilaj lernantoj. (La amikino eĉ lernis samtempe en mia rondo por progresantoj, kaj tie eĉ superis ĉiujn aliajn).

Iam mia kuzo salutis min Esperante, antaŭ entombiga ceremonio de familiano. Mi respondis, ke estas plej verŝajne la unua fojo ke Esperanto aŭdiĝas en tiu grandega tombejo. Sed kiom mi eraris: Tuj apud la freŝa tombo de nia familiano, kuŝas eterne... D-ro Henrik Mashler.

Esperanto ĉesis esti mia sekreta lingvo, kaj iĝis la \*familia\* sekreta lingvo. Kvankam ni ne uzas ĝin regule, ofte estas sekretoj dum familiaj renkontiĝoj, festaj manĝoj ks. E-o helpas nin aludi, averti, primoki, sen ajna socia malkomforto. Temas pri amuza afero, fakte, sed nur naivuloj ne konfesos, ke ne temas pri la sukceso de E-o, sed bedaŭrinde ĝuste pri la malo.

## GALERIO DE ESPERANTO-FAMILIOJ

Esperanto-familiojn vi renkontas ne nur en aranĝoj kaj kongresoj. Ankaŭ en revuoj kiel ĉi-tiu vi legas de kaj pri ili. Kaj la interreto iĝas pli kaj pli grava kiel komunikilo inter iliaj anoj.

Retumante, eble ankaŭ vi jam scivolis, kiel aspektas la personoj, kiujn vi neniam reale renkontis. Se temas pri anoj de Esperanto-familioj, baldaŭ helpos vin la TTT-ejo ĉe

<http://familioj.komputilo.org>

Tiun retlokon prizorgas nun Mario Belisle. Certe ankaŭ vi volas aperi tie, por montri vin al viaj geamikoj. Simple sendu fotoĵon montrantan vian familion al [familioj@komputilo.org](mailto:familioj@komputilo.org)


Se vi ne havas eblon sendi ĝin elektronike, vi povas uzi ankaŭ la helikpoŝton: helpanto Lars Sözüer skanos vian surpaperan foton, se vi ĝin sendos al la adreso:

Lars Sözüer  
Max-Zelck-Str. 11  
D-22459 Hamburg  
Germanio

Atentu, ke li ne resendos la fotojn.  
Esperante baldaŭ vidi vin en la reto,  
Lars.

Por instigi vin per bona ekzemplo  
jen la familio de Lars:

patro: Lars  
patrino: Christine Brücker  
filinoj: Alina Calibe Brücker (4 j. 6 m.)  
Melanie Leyla Brücker (2 j. 9 m.)



## INFANOJ, ESPERANTO-DOMO, KOSTRENA

Junulara restadejo "Esperanto- Domo" en Kostrena (ĉe la Adriatika maro, Kroatio) dum 31a majo ĝis 2a de junio gastigis lernantojn el 7 kroataj lernejoj, kiuj partoprenis en Kroatio konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj lernejoj. Dudekkvar lernantoj alvenis el Slavonski Brod, Zagreb, Varaždin kaj Matulji.

Premiitaj estis tri infanoj en elementa kategorio, tri en daŭriga kategorio. Pokalon "Kostrena 2002" gajnis Elementa lernejo "Mladost" Zagreb.


## LIBROBRETO

### ESPERANTO ABC

Eldonejo ESPERANTO en Norvegio eldonis novan libron, kiu devas ĝojigi i.a. gepatrojn kun “denaskitaj (kaj -otaj)” infanoj. Ĝi enhavas rakontetojn pri bestoj kaj infanoj de la tuta mondo kaj etajn, facilajn kantojn. La celo estas lude kaj amuzige vivigi la literojn per frazoj, kiuj ripetigu per laŭlegado.

Ĉiu unuopa litero ricevis kvarkoloran bildon priskribita per frazo. Ekz. por litero “B”:  
*Belga bakisto bakas bonajn bulkojn.*

La libro enhavas 32 paĝojn + kovrilon.  
Prezo: 9,90 eŭroj.



### MULTKULTURAJ FAMILIOJ DE NUNTEMPA EUROPO. Aktoj de la seminario okazinta 01-02.08.1996.

Aŭtoroj: R. Corsetti, A. Wandel, E. Csizsár, Z. Csizsár, N. Rašić, B. Vaha, Z. Tišljar kaj aliaj.  
Eldonis: Bratislavo: Esprima, 1996.  
166 paĝoj. Resumoj en la angla kaj slovaka.

La libro raportas pri samnoma projekto de Bratislava Internacia Centro por Familiaj Studoj. Ĝi enhavas inter aliaj analizon de ampleksa enketo sendita al pli ol 200 esperantistaj familioj en tuta Eŭropo.

Prezo: 6,60 eŭroj.



### SEN- La senelektra albumo de Persone

La disko enhavas naŭ novregistritajn kantaĵojn kiel ekzemple la jam klasika “Mi ĉiam kredis”, la mistika “Perloj sur la ter” kaj la svenige bela akustika transformado de la iama elektra furoraĵo “Revoj”. Aldone al la novregistritaj pecoj la KD finiĝas per du jam eldonitaj kantaĵoj kun plibonigita kaj remastrigita sono.

Prezo: 16,50 eŭroj.





## BONVENON!

MILENA, BETTI kaj NENAD

ĝoje anoncas la alvenon de fratino/filino

**SUNA JELENA**



52 cm, 3720 g(r)  
naskita 18.1.2002, 20.39 h

**DALILA KLARA**



50 cm, 3040 g(r)  
naskita 18.1.2002, 20.45 h

*Saluton!*

*Jen ankaŭ por la Cirkulaĵo por Esperantaj familioj la informoj pri niaj du novaj denaskulinoj.*

*Nun ni havas tri knabinojn, kaj Milena, kiu nun havas 3 kaj duonon da jaroj tre ĝojas kaj amas siajn fratinojn. Ŝi parolas ankaŭ kun ili nur E-on (ĝis nun), tiel ke ni havas esperon ke ankaŭ ili lernos la lingvon tiom perfekte kiel Milena.*

*La vivo kun niaj du novaj anĝelinoj estas iom streĉa sed tre bela kaj precipe la komenco estis interesa, ĉar mi naskis ilin hejme en akvokuvo ene de malpli ol tri horoj kaj tiam ni estis tuĝ tuta grandfamilio - kaj Milena ankaŭ povis ĉeesti la naskon...*

*Kun koraj salutoj*

*Betti*

## FAMILIAJ TRAVIVAĴOJ EN 2001

Pasintjare mia tuta familio estis en la urbeto "Togoville" (Togolando) kadre de la 9-a Togolanda Esperanto-Kongreso (de la 26-a ĝis la 31-a de decembro).

Antaŭ tiu tutlanda aranĝo, kiun partoprenis pli ol cent geesperantistoj, efektiviĝis ankaŭ memortago de L.L.Zamenhof – la Zamenhoffesto, celebrite en loka E-klubo "KEK" de la vilaĝo Kleve. Nur mia filino Adjoa kaj mi ĉeestis ĝin.

Hejme vizitis min krom jam konataj togolandaj esperantistoj ankaŭ sino Agnès C.Geelen el Belgio.

Lingve –

- \* Adjoa Alix parolas E-on kaj la median lingvon; ŝi eklernis antaŭ du jaroj en lernejo la francan.
- \* Ami Benata (4-jaraĝa filino) miksas E-on kun la media lingvo. Ŝi kompletigas unu per la alia (en frazo).
- \* Yao Elom (2-jara filo) komprenas E-on. Li tre ŝatas paroli nacilingve al siaj patrino kaj fratinoj. La tri infanoj amuzi ĝas inter si uzante la median lingvon.

K.ŝagbadjelou (el Togolando)

## NI REMEMORAS PRI ... Lucerno 1979

### REAGIS LA LEGANTOJ

*Ni ricevis la revuon Familia Esperanto. Estas ege mirinda foto. Ĝi pendas sur la muro de Thomas-ĉambro.*

*N-ro 4: Kleemann Yoshie - estas mi. Mi daŭre laboras en la praktikumejo de mia edzo kiel helpanto de kuracisto.*

*N-ro 19: Kleemann Thomas, nun 32 jara kuracisto, loĝas en Ludwigshafen (Germanio), laboras en urba malsanulejo.*

*N-ro 14: Kleemann Andreas, nun 30-jara inĝeniero pri maŝinkonstruado, studis en Karlsruhe (Usono), poste en Londono - Imperial College. Li doktoriĝis en majo 2001. Ekde septembro 2001 li laboras en Parizo.*

*Niaj infanoj daŭre uzas Esperanton kaj ankaŭ kelkaj aliaj de sur la foto, kun kiuj ili estas ĉiam bonaj amikoj (n-ro 22: Daniel Grossmann, n-ro 23: Katja Grossmann, n-ro 26: Claire Tortel, n-ro 12: Ines Frank, n-ro 13: Simone Fischer).*

*Korajn salutojn de la tuta familio Kleemann.*



Geedzoj Kleemann kun filo Thomas  
Doktoriĝo, aprilo, 2002



Andreas Kleemann  
Doktoriĝo, majo, 2002



Jen por via memorigo la bildo kaj la skemo pri la 17-a IJK - malgrandigite.

## NI REMEMORAS PRI ... 17-A INTERNACIA INFANA KONGRESETO, Lucerno 1979

La ĉarma grupfoto de la Lucerna Infana Kongreseto en 1979 estas tre konata al mi, ĉar jam dum multaj jaroj ĝi pendas super mia skribotablo. Sur la skemo mi havas la numeron 13, mi estis preskaŭ 9-jara tiam. Inter 1977 kaj 1985 mi partoprenis al 6 Infanaj Kongresetoj, la lastan jam kiel helpantino. Mi havas tre bonajn memorojn pri tiuj semajnoj, kvankam ne plu ege detalajn.

En Rejkjaviko (1977) ni estis nur 5-ope kaj la gepatroj alterne gardis nin en ĉambreto de la kongresejo; apud Stokholmo (1980) ni travivis aventuran semajnon en vilaĝo el lignaj dometoj kun baseno kaj saŭno meze en sveda arbaro; du jarojn poste ni loĝis en belga internejo kaj en 1983 en Budapeŝta vilao sur la Roza monteto.

Pri Lucerno mi memoras la junulargastejon, kie mi dividis la ĉambron kun japanaj knabinoj. Ni ekskursis sur la granda lago kaj en la montaro kaj miris, ke la svisoj faris grandegan pireteknikaĵon meze de aŭgusto. Dum la lasta mateno, kiam la infanoj faris prezentaĵojn por la gepatroj, unu tre malgranda japana knabino devis ludi ion sur eta violino - tion mi ne forgesis. Verŝajne mi kompatis ŝin, ŝi ankoraŭ faris erarojn kaj ne bone trafis la sonojn. Dek jarojn poste dum la UK en Brajtono mi ĉeestis koncerton de japana knabino, eble 14-jara, kiu ludis la violinan koncerton de Mendelssohn-Bartholdy kaj mi supozis, ke temis pri la sama knabino.

Mi esperantumas ĝis nun, dum dek jaroj mi aktivis en Germana Esperanto-Junularo, studis slavistikon kaj orienteŭropan historion kaj laboris en la universitato en Freiburg im Breisgau. Momente mi zorgas pri miaj du filetoj (2 kaj trikvaronarjaroj kaj 6 monatoj) kaj tenas kontakton al Esperantistoj per poŝto, telefono, interreto. Niaj filoj ne kreskas dulingve, sed mi intencas instrui al ili Esperanton poste.

Simone Fischer-Sorg, Saarbrücken, Germanio



numeroj 14

13

19



Thomas Kleemann

Saluton!

Jen mi ricevis la artikolon pri la Infana Kongreseto en Lucerno. Jes, mi bone memoras ĝin (mi estas Thomas Kleemann, n-ro 19) kaj ankaŭ la aliajn kongresanojn. Nun mi laboras kiel kuracisto. Esperanton mi pludaŭrigas kaj kelkfoje vizitas E-renkontiĝojn, plej laste IJS-n en Hungario.

Kelkajn el la foto mi poste renkontis, aliajn perdis. Do, mi tre ŝatus scii pri ili kaj dankas pro via iniciato.

Kore salutas,

Thomas Kleemann



## NI FUNEBRAS

La 17-an de aprilo 2002 en Volgograd, Rusio estis kruela murditaj aktivuloj de la klubo Espero geedzaj **Aleksandr Mihajlov** (1951) kaj **Nadejda Mihajlova** (1955) kaj ilia filino, denaska esperantistino, **Polina Mihajlova** (1981).

Laŭ informo de la enketistoj la murdon mendis 12-jara nevo de la geedzaj, la orfa Jaroslav, kiun ili adoptis antaŭ kelkaj jaroj. La murdintoj estas arestitaj.

*El: Eventoj 1/majo 2002*

Germana Esperanto-Asocio (GEA) funebras pri la tragike frua morto de unu el siaj plej simpatiaj aktivuloj, s-ino **Elisabeth Klünder** (1954 - 2002) el Steinfurt.

S-ino Klünder naskiĝis en Varsovio kaj eksciis pri Esperanto jam en la baza lernejo, kiu situas en la kvartalo kun la Zamenhof- kaj Esperanto-stratoj. Kvankam ŝi pli inklinis al arto, ŝi studis psikologion kaj laboris post la ekzameno en lernejo. Sed jam en 1979 ŝi translokiĝis al Steinfurt/Germanio kaj edziniĝis al la posta GEA-prezidanto Helmut Klünder.

En la Germana Esperanto-movado ŝi restis aktiva ĝis sia morto. De 1987 ĝis 1991 ŝi estis membro de la redakta komisiono de "Esperanto aktuell" kaj prizorgis la grafikajn kaj ilustraĵojn. Por la Printempa Semajno Internacia (PSI) ŝi ekde ties komenco en 1985 verkis la PSI-leporojn, kiuj estas famkonata simbolo de tiu aranĝo. En 1999 ŝi ankaŭ eniris la organizan teamon de PSI kaj ĉi-jare ankoraŭ preparis la kulturalan programon, kiun ŝi mem ne plu povis ĉeesti.

Ekster la Esperanto-movado ŝi estis sukcesa artisto, multe pentris, desegnis kaj gravuris sur diversaj materialoj. Ekspozicioj de ŝiaj verkoj estis en la urboj Steinfurt, Telgte, Münster, Köln, kaj Aachen.

*El: Esperanto aktuell 4/2002*



**K. KALOCSAY**  
**Septembro**

Septembro, granda majstro de la farboj.  
La monotonan verdon de la arboj  
Transpentras flava, ruĝa, ore-bruna.  
La vento gloras ĝin per zumaj harpoj.

**Oktobero**

El nubo morna kiel la noktombro  
Ĥspervas nin per splena pluv' Oktobero.  
Mediti vokas ĉambro. Sed en keloj  
Ĥam bolas mosf', por savi nin de sobro.


**CARMER BERROS DE GASZTOLD**  
**La preĝo de la grilo**  
TRAD. E. V. TVAROŽEK

Dio mia,  
mi estas tiel eta  
kaj nigra,  
sed mi dankas,  
ke vi sur mian humilan vivon  
verŝas la varman radion de la tago  
kaj la oran ombreon de la trifiko.  
Ĥkceptu do aŭfable  
fiun ĉi antaŭdonon de mia amo  
fiun ĉi grincan voĉon,  
ĉar ĝi venas el la koro.  
Ĥmen.



## KORESPONDI DEZIRAS

Gabriela kaj Samita Barbosa Pinheiro  
 Quadra 10N. Casa 50 A  
 72710100 Brazlandia - DF  
 Brazilo



☞ Gabriela estas 12-jara, Samita 10-jara. Ili ambaŭ estas membroj de la grupo NOVA ERAO kaj ankoraŭ ne tre bone regas Esperanton. Ĝojigus ilin poŝtkartoj aŭ kelkfrazaj leteroj de samaĝaj infanoj.

☞ Du bonaj amikinoj el Rumanio, ambaŭ 15-jaraj, serĉas korespond - amikojn kaj - amikinojn el la tuta mondo. Esperanton ili eklernis antaŭ unu jaro. Izabella ŝatas skribi kaj legi, Johanna legi, danci kaj sporti.

Izabella Oana Ciobanu  
 str. Görgényalja 899  
 Praid 4174  
 jud.Hargita  
 Rumanio

Johanna Ibolya Deák  
 Praid 4174  
 Mellékút 1072  
 jud.Hargita  
 Rumanio

## IRU NI AL...

### ❖ *Seminario por infangvidantoj.*

De la 8-a ĝis la 16-a de februaro 2003 estas planata seminario por interesiĝantoj involviĝi en la agadon pri infanoj kaj ĝi infangvidantoj de Internaciaj Infanaj Kongresetoj. Antaŭvidata loko estas Esperanto-Domo en Lesjofors (Svedio).

Kontaktu: David-Emil Wickstroem <wicki@gmx.at>.

### ❖ *Internacia festivalo*

La 19-a IF okazos en Borken-Gemen inter la 27-a de decembro 2002 kaj la 3-a de januaro 2003. Ĝi estis kaj estos aranĝo por lingve spertaj personoj, (baza) kono de Esperanto kaj ĝia uzado estas necesaj.

Kontaktu: Hans-Dieter Platz <HDP@internacia-festivalo.de>.

Postfach 1148

D-34303 Niedenstein

Germanio

### ❖ *Novjara renkontiĝo*

Ni invitas vin partopreni jarfine en nova renkontiĝo - Novjara Renkontiĝo (NoRo). Ni, tio estas kelkaj iamaj kunlaborantoj de Germana Esperanto-Junularo, ĉefe Dagmar Schutte kaj Lu Wunsch-Rolshoven. Ni volas refoje kunveni ĉirkaŭ Silvestro en internacia rondo kiel antaŭ jardeko dum internaciaj junularaj renkontiĝoj. Ni volas revidi amikojn kaj konatojn de tiam kaj konatiĝi kun multaj aliaj, kiuj intertempe lernis Esperanton - aŭ kiuj tiam ne povis ĉeesti.

Detalojn pri la renkontiĝo en pejzaĝa domaro trovi sur <http://www.EsperantoLand.org/eo/nr.html>

**La 18-a de oktobro estas en Finnlando TAGO DE L' FABELO, nomtaga festeto de knabinoj kaj virinoj nomitaj ŝatu (= fabelo).**

## NE NUR POR INFANOJ

### LUDO POR KOMENCANTOJ, KOMENCINTOJ KAJ PROGRESANTOJ

**NOMBRO DA LUDANTOJ:** La du teamoj.

**DAŬRO:** Sume dek minutojn.

**ILARO :** Kartoj surskribebblaj.

**LUDMANIERO:** La ludo povas varii inter tre simpla kaj tre komplika. Ĉiu klasano ricevas karton sur kiu estas frazo mimikenda. La spektantoj divenas kion li/ŝi mimikas. Venkas tiu teamo, kiu sume uzis malpli da tempo por siaj ŝaradoj.

**EKZEMPLAJ TEMOJ:**

- komencantoj: kafo, besto, fleĝistino
- komencintoj: dentisto kun dentodoloro
- progresantoj: oni celu emociojn: junulo suferanta pro amo...

**POENTUMO:** Bazaj kriterioj kaj tempa faktoro.

**KOLEKTIVA PRITAKSO:** Kiujn teknikojn oni povas ellabori por pli bone sin komprenigi ?

**El:** La sporta teatro de Joëlle Rabu kaj Joseffe Desquins, 1987

## HUMURO

Panio, vi havas kelkajn ĝrizajn harojn - rimarkas Romĉio.

La ĝepatroj ĉiam ĝriziĝas, se la infanoj ne obeas ilin - klarigas la patrino.

Do, mi jam scias kial avinjo kaj avĉio estas tute ĝrizaj - konstatas la knabo.

Min furioziĝas la maniero, en kiu mia edzino konstante parolas pri sia estinta edzo...  
Baĝafelo! La mia daŭre parolas pri sia estonta...

Malfrue iun vesperon juna kuracisto ricevis noton de tri amikoj: "Bonvolu veni al la klubo kaj partopreni ludon de briĉo kun ni."

"Jen," li diris al sia edzino, "jen mi estas denove fovokata. Estas grava kazo...tri aliaj kuracistoj jam estas tie!"

Kio estas la puno por bigamio?  
Du bopatrinoj.

### **krokodil - diplomo** (de Ernest Geleta)

Mi fieras parolanto de mia ĝepatra lingvo (ĉefe en E-renkontiĝoj), por malebliĝi ĝian evoluon, batalas akiri jenajn diplomojn:

- a. EMINENTA BATALANTO kontraŭ Esperanto
- b. DISBATANTO de tuta klubo
- c. HEROA TOMBOSISTO kontraŭ Esperanto
- d. SUBPAGANTO por forlasi Esperanton
- e. AMANTO DE MALAMANTOJ de Esperanto
- f. PRINCO DE KROKODILOJ



### **SOLVOJ DE LA KRUCENIGMO** el FAMILIA ESPERANTO 1/2002:

- HORIZONTALA: 1 - hamstr, 2 - vizaĝ, 4 - plum, 6 - helik, 10 - ĉizel, 11 - kork, 12 - barel, 13 - bicikl;
- VERTIKALE: 1 - horloĝ, 3 - ĝiraf, 4 - pian, 5 - cirkl.

## BONAN APETITON!

### *Lenta supo*

*Unu litro da akvo, 15 dekaĝramoj da lento, 3 dekaĝramoj da butero, 3 dekaĝramoj da faruno, 2 ajleroj, salo, pipro, peco da celeria foliaĝo, majorano.*

*La lenton ni kuiras kun celeria foliaĝo ĝis ĝi moligeĝas. Poste ni ĝian elbolaĝon salos, forigos la foliaĝon, denseigos la supon per hela butera fritfarunaĝo, aldonas frotitan ajlon, pipron, majoranon kaj ankoraŭ iomete kuiras. Ni surtabligas ĝin kun aldono de toastoj aŭ tranĉitaj panbuletoj frititaj en butero.*



## ENHAŬO

2. Editora angulo
- 2.-3. Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (Bart Demeyere)
4. Lingva angulo  
Desegnis por ni (Alina Brücker)
5. Lingva jarfino  
(James Rezende Piton)
6. Galerio de E-Familioj (Lars Sözüer)
7. Infanoj, E-domo, Kostrena
8. Librobroto
9. Familiaj travivaĵoj en 2001  
(Koukou Sagbadjelou)
10. Ni rememoras pri...  
(Familio Kleemann)
11. Ni rememoras pri...  
(Simone Fischer-Sorg, Thomas Kleemann)
12. Ni funebras  
Septembro, Oktobro (K.Kalocsay)  
La preĝo de la grilo  
(Carmen B. de Gasztold)
13. Korespondi deziras  
Iru ni al...
14. Ne nur por infanoj  
Humuro
15. Bonan apetiton!

## FOTOJ:

Titolpaĝe:

- supre: REF 2002 en Hungario (fotis Lars Sözüer)
- malsupre: UK - Fortaleza, 2002 (fotis Amri Wandel);

Dorspaĝe: de supre, maldekstre:

- Panjo kun sia filino dum PSI (foto el [www.esperanto.de/psi/2002](http://www.esperanto.de/psi/2002))
- REF (L.S.)
- Bieramantoj en Waldfischbach dum PSI (el TTT-paĝoj)
- James, Ada, Igor el Brazilo dum la UK (A.W.)
- Tali, Maja kaj Trevor Steele (A.W.)
- Junuloj dum PSI (el TTT-paĝoj)

### EL LA KALENDARO

**4.okt.** Tago de bestoj, mortodatreveno de Francisko el Asizo.

**15.okt.** Internacia tago de la blanka bastono (blinduloj).

**22.okt.** Internacia balbutadotago. Balbutado ne dependas de (manko de) intelekto!

**Ĉiu ricevinto de FAMILIA ESPERANTO povas libervole kontribui al UEA-konto de RF: ido-j**

REDAKTAS: Katarína Bodnárová, CO de UEA,  
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

